EKO 2022 Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ILEI

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, François Lo Jacomo

*EKO 2022-01 sendita el Budapeŝto la 1an de januaro*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

*Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA*

# AMO tra 2022

La planoj kaj esperoj por la nova jaro progresis jam pli bone ol en ajna antaŭa jaro, depost la lanĉo de la AMO-programo en 2014. Tiu progreso eblis pro la akceptigo de nova aktiva komisiono, jam prezentita detale en EKO 2021-55. Nur tial ni kuraĝas pluiri al tiom da seminarioj, tri el kiuj alvenis de komisionanoj mem. Jen la nuna stato de la preparado:

| Monato | Lando | Urbo | Statuso | Partneroj | Temo |
|---|---|---|---|---|---|
| Marto | Ĉinio | Pekino | **Kredebla** | ĈEL, JEI, KEA | Pli da junaj membroj tra Azio |
| Apr 1-5 | Francio | Bauge, Greziljono | **Certa** | Greziljono, IFEF-FR | Fervojao por daŭripova transporto |
| Majo 7-9 | Ĉeĥio | Beroun | Kredebla | IFEF-kongreso | Simila temo |
| junio | Aŭstralio | Sidneo ? | **planata** | AEA | Decidota. |
| Julio 25-26 | Pollando | Vroclavo | **Certa** | E-Centro Vroclavo | 135 jaroj de Esperanto: Visegrada kunlaboro* |
| aug | Kanado | Kebekio | Strebata | ILEI - kongreso | Eduka |
| aug | Italio | Brescia ? | Strebata | IEF | Decidota |
| Sept? | Monda | -- | Dezirata | IKEF | Decidota |
| Oktobro | Ukrainio | Odessa | Survoja | UKREA, ULEI | Kiel uzi *Zoom,* kiel instrui al emerituloj. |
| Nov 11-14 | Kroatio | Zagrebo | **Certa** | KEU, aliaj | Vortara farado |
| Dec. | Senegalo | Tieso | **Certa** | Afrika Komisiono | Decidota |

### Pliaj proponitaj eroj:

Seminario pri Esperanto-gazetoj. Centoj da ili ekzistas: ili devas trovi la manieron pluvivi en la nova epoko.

Seminario pri kolektado, kunlabore kun ELF-AREK (nova faka partnero). Por esperantistaj kolektistoj. Decidota ĝis la fino de februaro.

'Esperanto-peranto por prezento de la naciaj heredaĵoj' (unauvice sur la listoj de UNESKO). Povus okazi en septembro 2022 aŭ 2023.

* Plena temo"135 jaroj de Esperanto: homoj kaj okazintaĵoj". Visegrad = PL, CZ, SK, HU.

### Malasigno de numeroj

Ni scias klare, ke la numerigo ekos ekde 82. Neniom pli ni promesas. Kiel multaj el vi malkovris je via ĝojo aŭ konsterno, AMO estas blinda kaj neantaŭvidebla. Ĝi kapablas alporti egajn surprizojn. Do, ni laboregas por klarigi kaj definitivigi la planojn kaj per la nov-aspektiviga EKO 2022 kaj aliloke, vi trovos informojn.

------------------------

# Konferenco pri lingvo-politiko

En junio de 2022 okazos simposio pri »reguloj kaj instigoj en la lingvopolitiko kaj lingvoplanado« en Budapeŝto. Mi aldonas la alvokon por kontribuoj, kiu ankaŭ leĝeblas en la retejo: La limdato por kontribuoj estas la unua de marto 2022.

https://www.andrassyuni.eu/uploads/esemeny/577-call-for-papers.pdf

Bengt-Arne Wickström

# Nov-Zelando kontribuas al biologio en Vikipedio

En novembro mi kontribuis al la artikolo
https://eo.wikipedia.org/wiki/Planta_komunikado_per_mikorizaj_retoj

En oktobro mi kreis mallongan artikolon
https://eo.wikipedia.org/wiki/Penta%C4%A5romatio

En septembro mi kreis ĉi tiun artikolon (adaptita de angla artikolo)
https://eo.wikipedia.org/wiki/Artefarita_fotosintezo
kaj aldonis grandan parton al
https://eo.wikipedia.org/wiki/Biomimetiko

Donald Rogers

# Waringhien en la memoro

La 20-an de decembro mortis Gaston Waringhien (1901-1991), legenda esperantisto i.a. pro sia giganta laboro pri la *Plena Ilustrita Vortaro*. Memore al tio, la #LibroservodeUEA proponas plurajn librojn, kiujn li verkis, redaktis, kunverkis aŭ tradukis, kaj ankoraŭ aliajn librojn pri li, omaĝajn kaj biografiajn. Ni aliru:

https://mallonge.net/waringhien

Menciindas la ĉi-jare reaperinta en sia 4-a eldono *Parnasa Gvidlibro* (https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=1771), kaj la konciza biografio fare de André Cherpillod (https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=6292), kiu titoliĝas "Heroldo de la Internacia Lingvo".

## Renovigita retejo por la Afrika Komisiono

Unu el la ĉefaj celoj de https://www.esperanto-afriko.org estas havigi kaj arkivi informojn pri la ĝenerala afrika Esperanto-movado. Tial eblas aboni ankaŭ senpage al novaĵleteroj por regule ricevi perretpoŝte freŝdatajn novaĵojn pri la Esperanto-movadoj kaj ĝeneralajn informojn pri la kontinento. Bonvole vizitu la retejon, voki nin aŭ lasi al ni mesaĝon pri ajna zorgo. Ni volonte respondos al vi kiel eble plej rapide.

La unuaj rezultoj montras la retejon pli facile uzebla kaj administrebla, sed la klopodoj fari ĝin ankoraŭ pli vigla, fleksebla, alloga, tekstenhave pli freŝa kaj lingve ĝusta pluokazas sub la rigardo de la UEA-Komisiono por afrika agado. Volontuloj por kontrollegi la tekstojn estas bonvenaj.

La nova retejo konservis kelkajn el la antaŭaj funkcioj, krom aldono de novaj. Ekzemple, ĝi nun kapablas redirekti uzantojn al la sociaj retejoj kiel Fejsbuko, Telegramo, Instagramo, Tvitero k.s. Eblas fari esplorojn sur la reta reprezentejo de la kontinenta komisiono per la serĉilo, kontakti la mastrumantojn. Krome vizitantoj povas fari komentojn sub la afiŝitaj artikoloj. Mallonge, la nova retejo disponas multe pli da spaco, evitante forigon de malnovaj materialoj por meti novajn, kiel okazis regule kun la malnova retejo. La renovigo de la retejo kaj transigo de informoj de la malnova retejo realiĝis danke al plursemajnaj teknikaj laboroj de loka reteja gastiganto kun la helpo de Adjévi Adjé, aktiva membro de la Afrika Komisiono, kaj financa subteno de ESF. Por plene profiti la etendeblecon de la retejo, ni iom post iom igos ĝin ampleksa kaj profesia informbanko por diversspecaj esploroj pri Esperanto en Afriko.

**Adjévi Adjé**

## Komentoj de EKO kaj la Landa Agado de UEA

**Bela retejo kun potencialo por kreski la ampleksigi sian utilon. Sed bonigebla...**

- **Kreu subtemon 'Landoj' kie vi donu bazajn kontakt-informojn por asocioj kaj unuopuloj en landoj, kiuj ne havas la propran retejon. La aktuala eldono de <Landa Parad'> por Afriko donos tiujn bazajn informojn.**
- **UEA pere de EKO kaj sia Landagada komisiito pretigos detalan analizon de la nova retejo por trovi la pozitivajn elementojn, la mankon kaj lokojn, kiuj bezonas ampleksigon kaj eble reorganizadon.**

## Agas daŭre la amerika subtenilo de agado

Chuck Mays preparis raporton: **Jarfina ESF-ĝisdatigo 2021**

https://esfconnected.org/2021/12/20/jarfina-2021/

# AMO 81 la tria kaj lasta tago

La tago malfermiĝis per prezento de Mezotrofio (la kresko de ĉeloj en la homa korpo, greno-devenaj) kaj homa nutrado. S-ro Kouevigan Koffi Jerôme (sur la foto) subite



aperis por prelegi pri la lasta subtemo 'Kial lerni Esperanton. Lau li, la antauaj kialoj estis: interamikiĝo, komunikado, turismaj celoj, ktp. Laŭ li, la problemo pri komunikado jam solviĝs per la nuna stadio de la teknologio. Nun por solvi lingvan problemon oni povas uzi tre efikajn aparatojn. Nun oni devas alimaniere pensi pri la kialo de la lernado de Esperanto. Tiu ĉi estu konsiderata kiel movado au asocio, kiu zorgu pri siaj membroj; tiel T ankau la asocio evoluos.  Li emfazis, ke necesas ĉion fari ke oni perlaboru per Esperanto. Oni proponis ion kiel celon de la lernado de Esperanto. Oni havu vizion kaj por tiu ĉi kaj mision."

Sekvis la tasko fari konkludojn el la seminario. Jen la rezulto, kiun ni iam  komentos.

❶ - Landoj asocioj estu (re)starigitaj en Afriko.

❷ Starigado de fakaj asocioj en Afriko aŭ penatrado de jam ekzistatajj.

❸ Esperanto estu ankaŭ fonto de ekonomiaj aferoj

❹ Intensigita estu la kunlaborado de afrikaj esperantistoj kun ĉiuj ajn Esperanto-Organizaĵoj internaciaj kaj ankaŭ kun neesperantistaj organizaĵoj

❺ Por la disvastigo de Esperanto en Afriko, ties anoj kalkulu pli je propraj fortoj/rimedoj ol je tiuj de aliaj homoj/organizaĵoj






========= vortoj:  1030 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **17a aŭgusto 2021** (per EKO 2021-34). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la sendolisto.